

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Smorilo

54-a jaro - n° 7

Decembro 1962

Demandu provveturon per
la nova

Ford Anglia

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



rekta distribuanto por Brugge kaj

ĉirkaŭaĵoj

GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

TEL. 34611

Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.e.f.

REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, SINT-KIARAAREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :


DR. POL DENOËL
BRUNO DENOËL

ISERENTANT ROGER
POUPEYE CHARLES

COUWENBERG F.
DE CUYPER GEORGES
DE MARRÉ LUC

ADMINISTRADO :

TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

DE BRUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377558

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD
JAUMOTTE MAURICE

ĜENERALA SEKRETARIO

DE MARRÉ LUC, GROENENDAALLAAN 232, ANTWERPEN TEL. (03) 41912

SEKRETARIO POR LA FLANDRALINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLODOT, MONCEAU SUR SAMBRE

KASISTINOJ

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT
PORKONGRESA : PLYSON J. 23, PLACO E. FLAGEY, BRUSELO 5 P.K. 236804

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

FR. SCHELLEKENS, FRANS HEASSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2
P.K. 9051.25

POŝTKONTO DE B.E.F. :

1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT

Pro la plenefektiviĝo de la kunfandiĝo inter la du ĝisnunaj Ligoj ekde la 1-a de januaro proksima, ni insistas por ke ĉiu atentu la kelkajn liniojn, kiuj sekvas :

Ĉiuj ĝisnunaj membroj de Grupoj repagu al sia grupa kasisto, ne nur sian grupan kaj do federacian kotizon, sed ankaŭ sian kotizon de individua membro de U.E.A.

Do, membroj de grupo ne sendu sian U.E.A.-kotizon al la Ĉefdelegito.

La Grupkasistoj do klopodu enkasigi samtempe la kotizon por la grupo kaj federacio kaj la kotizon de M.S., M.A. aŭ M.J. de U.E.A.

Nur la individuaj membroj, kiu izole vivas en aglomeracio, urbo aŭ komunumo, en kiu ne ekzistas grupo, pagu rekte al la Federacia Kasistino F-ino J. Terryn. Kaj ili pagu, per unu ĉirilo, samtempe la kotizon por la Federacio kaj la kotizon por U.E.A., se ili estas individua membro.

DO, ni resumas :

GRUPmembro : al la grupa kasisto : la ordinaran kotizon kaj eventuale la U.E.A.-kotizon ;

IZOLA membro : al la federacia kasistino : la ordinaran kotizon kaj eventuale la U.E.A.-kotizon.

Por eviti crarojn ni ĉi sube memorigas la U.E.A.-kotizon :

Membro-subtenanto	F 300
Membro-abonanto	F 200
Membro-jarlibro	F 100
Junulo-M. abonanto	F 100
Junulo-M. jarlibro	F 50

La individuaj, do izolaj membroj trovis jam sian kotiz-tabellon en la antaŭa numero de nia revuo.

La kotizoj, pagotaj al la grupoj diferencas de grupo al grupo.

NOTINDAJ POSTCEKNUMEROJ

Ni citas ĉi sube, por ke ĉiu enskribu ilin en sia nova poŝ-agendo por 1963, tri poŝtceknumerojn, kiuj ĉiumomente povas interesi niajn membrojn kaj legantojn :

Belga Esperanto-Federacio: 16.34.34 Raapstraat 72 Gento
 Ĉefdelegito de U.E.A.: 90.51.25 S-ro Fr. Schellekens, Antverpeno
 Eldonejo-Librejo « SONORILLO » : 15.21.40 Blankenbergsteeweg 72 Bruĝo
 Por kongresaj pagoj: 23.68.04 S-ino J. Plyson, Bruselo

Ni ankaŭ memorigas pri kelkaj la numeroj al kiuj la membroj de grupo povas pagi sian kotizon:

Antverpena Esperanto-Grupo « Le Verda Stelo »: 726.54
 Bruĝa Grupo Esperantista: 4835.33
 Esperantista Brusela Grupo: 1230.48
 Gento: B.E.B. (Gentse Afdeling) 4507.20
 Karlareĝa Grupo Esperantista: 6732.84
 Lieĝo: S-ro J. Henrion, Brd. Ern. Solvay, 144: 1029.83
 Verviers: S-ro J. Héron, rue des Haines, 36: 316.21

Sekvo & fino de la raporto

SABATO 11.8.'62

Solena Fermo de la 47-a Universala Kongreso de Esperanto

D-ro Ivo Lapenna komunikis en plej mallonga formo la ĉefajn decidojn de la Komitato, kiu kunsidis plurfoje dum la Kongreso. La unua tasko de la Komitato estis kompletigi la Komitatanojn per Komitatanoj C. Post ioma diskuto la Komitato elektis dek Komitatanojn C. La Komitato elektis diversajn komisionojn: Elektokomisionon, Financan kaj Administran, Eŭropa Lingva Kampanjo. La Komitato akceptis du aliĝpetojn: de Hungara kaj Libana Asocioj, kiuj estis akceptitaj al U.E.A. Sekve la membraro kreskis, kaj ni nun atingis 33.000 membrojn.

La Komitato unuanime akceptis la Estraran Raporton.

Estas elektita la nova estraro de U.E.A.:

La prezidanto: Prof. D-ro Hideo Yagi, Okayama, Japanujo

Vicprezidantoj: S-ro H.W. Holmes O.B.E., Londono

S-ro E.L.M. Wensing, direktoro de Departemento de Elektro-Medicinaj Aparatoj de Philips, Eindhoven

Ĝenerala Sekretario: Prof. D-ro Ivo Lapenna, Londono

Estraranoj: S-ro E.J. Woessink, Arnhem, Nederlando

D-ro A. Albault, okulkuracisto, Toulouse, Francujo

S-ro Sven Ziegler, Kopenhago, Danlando

S-ro Z. Csuba, Varsovio, Pollando

D-ro Lapenna prezentis la personecon de novaj estraranoj kaj klarigis, ke oni dispartigis la laboron en la Estraro. D-ro Herrmann ne volis plu esti en la Estraro pro troa okupiteco, kaj s-ro Norman Smith ricevis postenon en la Universitato de Ghana.

La laborplano de la Asocio estas akceptita unuanime.

S-ro Llech-Walter donis 5.000 guldenojn por la ĉambro de U.E.A., tiel ke ni nun havas kvin pagitajn ĉambrojn.

La Estraro diskutis ankaŭ la eldonadojn: "Monda Kulturo" aperos trifoje jare, kaj s-ro William Auld estos ĝia redaktoro. D-ro W. Sadler ekde la februara numero transprenos la redaktadon de "Esperanto". D-ro Lapenna plue informis, ke alvenis kortuŝita letereto de ĝes-roj Derks el Monte Carlo, kiuj esprimis pretecon doni 5.000 guldenojn por U.E.A. ĉambro.

La Estraro diskutis agadon en Afriko kaj Azio. Aperis angla-lingva broŝuro kun la celo disvastigi Esperanton en Afriko, kaj oni devas klopodi ke ĝi estu distribuata al la studentoj el tiuj landoj.

Firma Van Iseghem & Verstraeten,

P.V.B.A

ST BERNARDSE STEENWEG, 631 HOBOKEN

VITRALOJ - SPEGULOJ - „SECURIT“ VITRO
KOLORIGITAJ VITROJ
KLUMINIAJ SENMASTIKAJ STANGOJ POR
KUPOLOJ

VITRO-CEMENTO POR TUTVITRA-KONSTRUJAŬOJ
MASTIKO

telefono 37.88.20

V. Oljanov, reprezentanto de Bulgara Esperanto-Asocio, esprimis dankon de bulgaraj esperantistoj kaj esperon pri amasa vizito en Sofio sekvontjare. Li klarigis, ke la 48-a Universala Kongreso en ĉarma mentara urbo Sofio kun bela naturo, tre malmultekostaj hoteloj kun multe da suno. En Sofio estas ses Esperanto-societoj kaj loĝas pli ol 2.000 geesperantistoj, kaj tie okazos la Dua Internacia Arta Festivalo.

D-ro Paul Neergaard tansdonis la standardon al la organizantoj de la 48-a U.K., kaj S-ro Holmes la simbolan martelon al la nova prezidanto de U.E.A. Prof. Hideo Yagi, kiu dankis pro la konfido donita al li. Post tio li batis per la martelo kaj poklamis la Kongreson fermita. Per kantado de himno la Kongreso finiĝis.

Tiun detalan raporton ni dankas al S-ano Marinko Ĝivoje kaj al F-ino Nora Hartwich.

ESPERANTO KAJ NEO

Ĉiuj niaj legantoj, en la lastaj monatoj, certe jam ion aŭdis pri nova lingvo-projekto, kiu emus anstataŭi la Zamenhofan lingvon. Temas pri NEO de S-ro Alfordari.

Pasintan jaron jam, Brusela organizajo, la « Cercle Constructif de la Vie Sociale », intencis aranĝi debatvesperon, dum kiu defendantoj de ambaŭ lingvoj, havus okazon doni klarigojn pri Esperanto kaj Neo. Post paŭzeto, tiam sekvus publika debato.

Pro malsano de la kreinto de Neo, tiu debato ne okazis ĝis nun.

Ni ekscias nun, ke la citita organizajo intencas okazigi ĝin mardon, la 12an de marto 1963.

Nia federacia prezidanto S-ro Maurice Jaumotte tuj akceptis la inviton de la organizantoj fari duonhoran prelegeton pri Esperanto kaj poste debati kun la aŭtoro de Neo, pri la avantaĝoj de nia lingvo, kaj pri la nepra dezirindeco kaj neceseco, ke ĉiuj helpu al la finsukcesigo de Esperanto, sola tielnomita « help »-lingvo, kiu per 70-jara ekzisto kaj ĉiam pli vigla vivado akiris la ununuran ŝancon esti akceptita, prefere al la naciaj lingvoj.

HISTORIO DE UNU MANUSKRIPTO

Antaŭ la unua mondmilito jam, la fama franca eldonejo « Hachette » aperigis ĉiujn verkojn de D-ro L.L. Zamenhof.

Inter tiuj ĉi verkoj estis ankaŭ la « Fabeloj » de H.C. Andersen.

Je la momento kiam Hachette ĉesigis la eldonon de esperantaj libroj kaj transdonis la eldonrajton al la Esperantista Centra Librejo, en Parizo, parto de tiuj ĉi « Fabeloj » tamen ne jam estis aperinta.

Kaj povis ŝajni al multaj iom strange, ke tri volumoj de tiuj « Fabeloj » aperis, dum la manuskripto de la kvara kaj lasta volumo restis en tirkesto.

En la ĵusaperinta numero de « Heroldo de Esperanto » ni trovas kelkajn detalojn pri la historio de tiu lasta manuskripto de la Majstro, kun la anonco de la baldaŭa aperigo de tiu ĉi lasta verk-parto de D-ro Zamenhof :

Kiel ni jam informis, baldaŭ aperos la 4a volumo de la « Fabeloj » de H.C. Andersen en la traduko de D-ro L.L. Zamenhof.

Ĝin eldonos « Heroldo de Esperanto », kiu ricevis la eldonrajton de la Belga Esperanto-Instituto, kiu, siavice, akiris ĝin de la Esperantista Centra Librejo. Kiel konate, la Esperantista Centra Librejo aĉetis la solrajton pri eldonado de la zamenhofaj verkoj de la libro-eldonejo Hachette, kiu posedis tiun rajton sekve de kontrakto kun D-ro Zamenhof rekte.

La manuskripto de D-ro L.L. Zamenhof restis longan tempon prespreta. La preparoj por la eldono komenciĝis en 1939. La tuta libro jam estis kompostita en Antverpeno kaj la presprovaĵoj korektitaj de Lidja Zamenhof, la filino de la iniciatinto de Esperanto, kiam la milito eksplodis.

Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, la kompostaĵo estis konservata en la presejo dum la tuta okupada periodo, sed en la lastaj tagoj de la milito, kiam la invadintoj jam forlasis la landon, Antverpeno estis bombardata per raketbomboj (V2). Unu el ili trafis la presejon kaj detruis ĝin kune kun la kompostaĵo. Feliĉe, la prezidanto de R.B.L.E. kaj de B.E.I. S-ro M. Jaumotte, sukcesis konservi la presprovaĵojn kaj dank' al li la verko finfine estas aperanta ».

Ĉar Belga Esperanto-Instituto, same kiel Flandra Esperanto-Instituto ĉesis propran laboron sur la librovendada kampo, ni forte konsilas al niaj legantoj sin tuj direkti al nia nova Eldonejo-Librejo « Sonorilo », Blankenbergsteeweg 72, Brugge, por mendi, antaŭ la 25 - 1 - 1963, akirante tiel la kvaran volumon je la favora prezo de 120 F (150 post tiu dato)

Ĉe sia pago, la mendontoj aldonu 10 % por la sendkostoj. Ĉiu volumo enhavos rabatkaponon kun valoro de ĉirkaŭ F 15 kaj uzeblan por aĉeto de la unua, nun elĉerpita unua volumo, kiu estos baldaŭ represata, same kiel cetere la dua kaj tria, kiuj laŭvice sekvos.

FEDERACIAJ SCIIGOJ

Sukcesplenan novan jaron deziras al vi „Sonorilo“

NI DENOVE HAVAS ĈEFDELEGITON

En la lastaj jaroj, en Belgujo ne plu estis ĉefdelegito de U.E.A. La du Ligoj, aliĝintaj al U.E.A., efektive mem perantis, kun la helpo: por R.B.L.E., de la sinsekvaj gekasistoj; por FL.L.E., de S-ro Fr. Couwenberg, kiu efektive funkciis kiel oficiala peranto.

Pro la kunfandiĝo de ambaŭ Ligoj en la nova Federacio, U.E.A. petis ke finiĝu tiu iom stranga situacio kaj la estraro do petis al ambaŭ ĝisnunaj perantoj, ĉu unu volis estonte funkcii kiel ĉefdelegito.

Pro malsamaj kialoj, sed kun definitivaj argumentoj, S-ino Rosa Van Herck-Huysmans kaj S-ro Couwenberg malakceptis la novan funkcion, malgraŭ amika insistado de diversaj estraranoj.

Dum kunsido de la administrantaro, la estraro tiam proponis al S-ro Ch. Poupeye, malnova kaj lerta samideano, prezidanto de bruĝa grupo, ke li akceptu la funkcion... Sed ankaŭ li, post pripenso, informis la estraron ke li ne povis akcepti.

La estraro tiam sin turnis al juna samideano el Antverpeno kiu, jam de diversaj jaroj, helpas en sia urbo kaj en la nacia organizaĵo en la plej diversaj taskoj, preni la ŝarĝon sur sin... Kaj S-ro François Schellekens akceptis.

Nomigo de Ĉefdelegito tamen ne dependas nur de la estraro de la landa asocio, sed ankaŭ, se ne precipe, laŭ artikolo 14 de la Ĝenerala Regularo de U.E.A., de la Ĝenerala Sekretario de tiu organizaĵo.

Per letero de la 7a de novembro, D-ro I. Lapenna komunikis ke « li volonte siafere donas sian konsenton ». Kaj li aldonis « Sekve tiu ĉi afero estas likvidita kaj S-ro Schellekens estas nia ĉefdelegito por Belgujo ».

Sur malpli oficiala tono, D-ro Lapenna memorigas samtempe ke li renkontiĝis hazarde, pasintan jaron, surŝipe de Capri al Napoli, kun S-ro Schellekens kaj ke tiu ĉi lasis bonegan impreson kaj li konkludas « ke li estas certa, ke li konsciencie plenumos sian taskon ».

Ĉar tiu opinio koincidas kun tiu de la tuta estraro kaj certe ankaŭ de la tuta administrantaro de nia Federacio, ni kun sama fido havigas al nia juna amiko, niajn plej korajn gratulojn, kun cetere nia sincera dankesprimado.

STARIGO DE BELĜA TEJO-SEKCIO

Jam de kelka tempo junaj gemembroj de « La Verda Stelo », Antverpeno kaj kelkaj aliaj ne jam apartenintaj al nia movado,

decidis kunveni kaj starigi J.A.S. en Antverpeno, kun la celo konvinki kiom eble plej multnombrajn gejunulojn pri la utileco de Esperanto kaj kunigi tiujn gejunulojn.

Tiu juna grupo invitis, la 27an kaj 28an de oktobro dek junajn eksterlandajn samideanojn: 5 nederlandanojn (inter kiuj S-ro Schippers, la nova kaj juna prezidanto de LEEN), 3 germanojn, 1 svedinon kaj 1 jugoslavon kaj kelkajn aliurbajn belgojn ĉeesti semajnfinojn, dum kiu okazis kunvenoj, promenadoj, kvizoj, dancoj, ktp.

Dimanĉon posttagmeze, tiuj 28 gejunuloj laŭ iniciato de S-ro Wim Desmet, speciale kunvenis kun la celo starigi belgan TEJO-sekcion. La konkludo de tiu grava kunsido, kiun partoprenis ankaŭ S-ro M. Jaumotte, prezidanto de la Belga Esperanto-Federacio, kiu konsilis kaj fine gratulis la kunvenintojn, estis la starigo de provizora estraro de tiu TEJO-sekcio por Belgujo. Tiu estraro konsistas el:

Prezidantino:

F-ino Fanny DANCKAERTS (Antverpeno)

Vicprezidantoj:

S-ro Bruno DENOEL (Lieĝo)

S-ro Nico VAN HERCK (Bruselo)

Ĝenerala Sekretario:

S-ro Roger VAN HUMBEECK (Mehleno)

Sekretario valona:

S-ro André DENGIS (Lieĝo)

Sekretario flandra:

S-ro Christiaan DECLERCK (Ostendo)

Kasisto:

S-ro Ivo DURWAEL (Antverpeno)

La tasko de tiuj ĉi gejunuloj certe ne estos facila; sed ĉiuj estas plenaj je bonvolo kaj laboremo, tion certigis al ni la prezidantino,

Fanny DANCKAERTS.

HET WELGERENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken


GROTE KEUS
IN GERED KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - CABARDINEN - LODENS
STIJLVOL HAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

KRUCVORTENIGMO no 2



Horizontale :

1. Muziknoto — prepozicio — preciza tag'
2. sam' — sudeŭropano
3. trovebla sur la koverto de via revuo — sufikso
4. faro
5. Tiu kiu kredas ke deziro realiĝos
6. Nomo de litero — unua part' de la nomo de sud-amerika ĉefurbo
7. Unuiĝo
8. Kiel malgranda kornbesto
9. Prepozicio — sukceso
10. Interjekcio — grekdevena prefikso — sekve.

DIFINOJ

Vertikale :

1. Lok' kie oni akiras scion — por eterna'
 2. Far' — kanapo.
 3. du sinsekvaj literoj — virina antaŭnomo.
 4. Komplete — Kvar unuaj literoj de komunumo en Brabanto.
 5. Returniren.
 6. Kiu koncernas fermilon — sonĝo dum maldormo.
 7. Ĥemia simbolo — malkonfirmate.
 8. Prepozicio — viktim' de la itistoj — moner'
 9. simbol' — nomo de litero.
 10. Ceremonia vesto — ero ŝarĝita per elektro.
- N.B. 1) Simpatia devizo estas formata per la horizontalaj vortoj : 1 (dua), 3 (unua), 5, 7, 9 (du vortoj).
 2) La apostrofo (') post difino, aŭ post iu vorto de la difino, montras ke nur la radiko estas enskribota, do sen finaĵo.
 3) La solvo aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos ellotata.
 4) Sendu vian solvon al : Ch. Poupeye, Elf Julistr. 11, Bruĝo, dum la 10 unuaj tagoj post la apero.

SOLVO DE LA PROBLEMO N° 1

V I Z I T K A R T O
 E Z O K O — N E I S
 L — O T — S A N K T
 O R L E A N S — U R
 C — O R D — I — L A
 I N G O — I D E — C
 P — I — T O — T — I
 E P O S O — L U — S
 D E — C — D I L E M
 O S C I L A T O R O

Rimarkoj :

- 1) Bedaŭrinde forfalis la difino V. 9, dua vorto : « part' ». La problemo tamen restis solvebla !
- 2) La difinoj H 7 kaj V 5 (3a vorto) estis ambaŭ « litero ». Pro manko de ĉiu alia kruciĝo, ĉiu litero estis akceptebla.

R E C E N Z O J

Pierre BURNEY: « Les Langues Internationales ». Coll. « Que Sais Je ? » Eldon
 « Presses Universitaires de France ». Por Belgujo: éd. Labor, Rue Royale 342,
 Bruxelles 3. 128 paĝoj. Prezo: 30 belg. fr.

En tiu volumo de fama kolekto la aŭtoro trafte priskribas « la babelismon » en ĉapitro 1; en ĉap. 2 la solvojn de la pasinteco, i.a. la universalecon de la Franca lingvon en la 18a jarcento, kaj la elkreskiĝon de artefaritaj lingvoj en la 19a kaj 20a jarcentoj. Tie ni trovas tuj ion kio malkontentigas nin. Paĝo 23: « ... estas nur kelkaj dekoj de tiuj lingvoj kiuj estas proksimume finfaritaj kaj koheraj, estas nur kelkses kiuj estas vere praktikataj. Kaj la plej disvastigitaj inter ili, se ili povas fieri pri fidelululoj en ĉiuj partoj de la mondo, tamen ili estas finfine parolataj de nur manpleno da homoj ». Tio estas absolute misprezento de la afero ! Ne por kontentigi nin, sed pro nura scienca objektiveco la aŭtoro devis distingi inter la kelkaj aliaj projektoj kaj la impona esperanto ! Impona ĉar nur esperanto estas ĉie disvastigita; ĉar nur ĝi havas tiom kaj tiom da grupoj, revuoj, manifestacioj ktp.

En la tre interesa kaj ampleksa ĉapitro 3 li pritraktas la « grandajn lingvojn internaciajn naturajn ». Ni komprenas ke li speciale atentis pri « lingvo kaj kulturo Francaj tra la hodiaŭa mondo ». Li donas multajn ciferojn pri kiuj ni esperas ke ili estas ĝustaj. Ni ne kontrolis kvankam en kelkaj kazoj ni povis fari; ja nur la ĝenerala tendenco interesas nin kaj la starpunkto je esperanto. Ni devas tamen esti ekstreme singardemaj koncerne liajn interpretadojn. Ekzemplo: li pensas ke en nia lando la Franca lingvo ankoraŭ ĉiam progresas pro la fakto ke li konstatas la franciĝon de la Brusela periferio. Li forgesas aŭ ne scias ke en la Nederlandlingva parto de nia lando la Franca lingvo rapide malprogresas. La publika vivo fariĝis tie Nederlandlingva. Kaj, por doni alian ekzemplon, kaŭze de la ĝeneraligita nederlandlingva instruado estas nun eĉ multaj kuracistoj, advokatoj kaj aliaj intelektuloj kiuj preskaŭ ne plu konas la Francan lingvon. Leviĝas nun la tendenco por akceptigi en la lernejoj kiel duan lingvon, ne plu la Francan sed la Anglan.

En dua parto de tiu ĉapitro li prikonsideras la naciajn lingvojn kiuj estas kandidatoj al universaleco. Li estas sufiĉe objektiva por konsenti ke la Franca lingvo relative malprogresas en la mondo. Li donas interesajn faktojn kaj ciferojn pri la progreso de la Angla lingvo. (Ankaŭ iom pri la evoluo de tiu lingvo; atentinda por la esperantologoj !).

Sed li tre duhas pri la ebleco de la Angla kiel mondlingvo pro la grandegaj malhelpoj kaŭzigitaj de la aliaj gravaj naciaj lingvoj kaj de la junaj ĵus leviĝantaj nacioj. Tute prave ! Saman juĝon li havas pri eventuala dulingvismo Angla-Franca. Ankoraŭfoje, tute prave ! Tiel li alvenas en la 4a ĉapitro al la internaciaj lingvoj artefaritaj kaj « duon-artefaritaj ». La Latina devus tiel multe transformiĝi ke ĝi tutsimple ne plu estus la Latina (klasika) lingvo.

Nau paĝojn li dediĉas al esperanto. Li donas la kritikojn kiujn kelkaj esprimis; kaj ofte li defendas esperanton en tio. Li eĉ scias ke ekzistas nun ia « invado de neologismoj ». Li tamen kritikas en esperanto la akordiĝon en kazo kaj pluralo de substantivoj kaj adjektivoj, kaj la ekziston de akuzativo. Li opinias ilin kritikeblaj ĉar la Angla kaj la « naturalistaj » interlingvoj « malhavas ilin sen domaĝo ».

Ni scias ke spertoj de jardekoj montris ilin necesaj por gramatika klareco. Povas esti ke sen ili la Angla lingvo restas sufiĉe klara... por Angloj; kondiĉe ke ili obeas certan ordon en la vortoj de la frazoj. Se oni volas liberigi sin de tiu necesa ordo restas nur la akuzativo por distingi inter subjekto kaj komplemento. Pli grava ŝajnas lia kritiko sur paĝo 94. Li ja volas konsenti ke la aserto de G. de Reynold estas troigita kiam tiu lasta diras ke «en esperanto oni povas traduki ĉion, sed esprimi nenion». Sed li diras ke tiu aserto estas tamen parte vera pro la fakto ke esperanto fatale foroferas nombron da nuancoj esprimitaj de la naturaj lingvoj pli komplikaj sed pli riĉaj».

Kaj li daŭrigas: «La elemento afekcia... trovas malfacile sian lokon en tiu klara lingvo kie ĉio estas eksplicita, tiu lingvo «pli preciza ol la penso» (Dr. Bakonyi) (Tio lasta estas nur bela frazo!) Le vero estas ke iu traduko el nacia lingvo, tio dependas nur de la arto de la tradukanto-artisto. Mi kredas ke Kalocsay, Baghy, Auld, M. Boulton kaj multaj aliaj sufiĉe pruvis ke tio eblas ankaŭ en esperanto. Se Burney vere konas esperanton, li legu kelkajn verkojn.

Fine de sia studo pri esperanto li venas al du konkludoj kiuj estas tute malgustaj (p. 96) Li diras unue ke la movado estas haltigita en sia progresado kaŭze de la du mondmilitoj; kaj due, ke ĝi estas malfortigita pro la apero de konkurencantaj artefaritaj lingvoj. Antaŭ tiaj asertoj kontraŭaj al la realo, ni devas diri: aŭ Sro Burney ne science priserĉis la aferon, aŭ li mensogas. Verŝajne li — tro supraj — lasis sin misgvidi de la fakto ke la publikaj kursoj en kelkaj okcidentaj landoj ne plu havas tiel grandan sukceson? (Ankorau li devus serĉi la kaŭzojn de tiu fenomeno). Sed science esplori la esperanto-movadon signifas mondscale esplori ĝin! Kaj tiuj konkurencantaj lingvoj efektive skeptikigas iun nombron de personoj (la tie-ĉi priparolita verko faros la saman) sed multe pli grandaj estas la nombroj de novaj adeptoj, kaj multe pli granda estas la ekinteresiĝo de oficialuloj kaj gvidantoj pri esperanto.

Ne pensu pro tio ke li kredas en la venko de unu de la aliaj interlingvoj. Tute ne. Li vidas en ili tro gravajn mankojn aŭ malkvalitojn. Li fakte ne vidas solvon por la problemo; kaj do ne proponas. Li ekzemple konstatas ke la naciaj lingvoj pli kaj pli alproksimiĝas kaj certagrade interpenetras. Sed «tio ne devas kaŝi antaŭ ni la persiston de la antagonista fenomeno de la diverĝeco» (p. 109). Li do turnas sin al alia elirvojo kaj priparolas la instruadon de fremda(j) lingvo(j) al la tutjuna infano. Sed li ne diras kiujn lingvojn! (p. 110-111). Cetere li dubas pri la boneco de tia sistemo en koncerno kun la lernado de la propra lingvo (p. 112) kaj li eĉ timas ruinigajn psikologiajn sekvojn (p. 113). Do, la afero ne jam estas ebla (p. 115). La aŭtoro estas iom en kontraŭdiro je si mem kiam li diras unuflanke ke «pli kaj pli da homoj bezonas pli kaj pli lingvojn pli kaj pli multnombrajn» (p. 116-117) kaj aliflanke ke «la bezono de mondlingvo estas spertata nur en tre limigita sektoro... tiu de la esplorado, de la interŝanĝoj kulturaj kaj sciencaj (p. 122). La dua aserto ne estas vera, kaj... la sektoro kiun li mencias estas tamen vastega!

Cie la aŭtoro vidas fortajn kontraŭstarojn je la proponitaj solvoj. Kaj tial li opinias ke la movado interlingva devus esti unueca kaj malpli pretendema. Kiel ekzemplon li citas la Interlingva kiu volas trudi sin nur sur la terenoj de scienco kaj tekniko. Ĉu vere tio estas la bona metodo? Ni nur povas rideti pri tia propono. Esperanto, plenalvora lingvo, montriĝas taŭga sur ĉiuj terenoj. Do, sur ĉiuj terenoj ni daŭre agadu. Tiuj kiuj ne volas esti kaj resti blindaj finfine devos agnoski tiun fakton!

La fina impresio post legado de tiu libreto estas ke ĝi predikas skeptikismon, ne rilate al la solv-**endeco** de la problemo, sed rilate al la solv-**ebleco**. La konkludo de la aŭtoro estas atendismo! Ege bedaŭrinde! en libretserio kiu estas vaste legata kaj ŝatata pro scienca seriozeco. Kelkfoje la verkinto staras tiel proksime de nia starpunkto. Ĉu li timas preni starpunkton? Ĉu interne li sentas ion kontraŭ esperanto? Kiamaniere eniris la verketon malveraj asertoj kiuj ja ne povas pluvivi post scienca esploro? Ni nur povas bedaŭri... kaj plu agadi por Esperanto!

Drs. F. ROOSE, Brugge.

BENELUKSA Provizora Programo

La programo kompreneble ne jam estas definitive fiksita; ĝi grandlinie tamen aspektos jene:

Sabate: Tagmeze: Malfermiĝo de la Akceptejo k. Poŝtoficejo.

Posttagmeze: Vizito al fama muzeo - Interkonatiĝo

Je la 17,30a horo: Oficiala Malferma Kunsido

Je la 18,30a horo: Komuna Vespermanĝo.

Je la 20a horo: Kultura kaj teatra vespero.

Dimanĉe: Je la 9a horo: Di-servoj (katolika kaj protestanta)

Je la 10a horo: Kunsidoj de la du Asocioj

Je la 11,15a horo: Komuna fotografado (Operdomo)

Je la 12a horo: Oficiala Akcepto en la Urbdomo

Je la 13a horo: Tagmanĝo (laŭ plaĉe)

Je la 14a horo: Vizito al la Rubensdomo. Eventuala daŭriĝo de la kunsido de L.E.E.N.

Je la 18a horo: Kongresa Festeno

Je la 20,30a horo: Kongreso Balo.

Lunde: Je la 9a horo: Foriro por aŭtoĉara Ekskurso al la

Lando de Waes (Orient-Flandrio),

kun vizitoj al diversaj pitoreskaj lo-

koj ĉe aŭ apud la Skeldo; ankaŭ al

la Skeld-historia Muzeo, en Rupel-

monde.

Je la 12,30a horo: Komuna Tagmanĝo

Je la 14a horo: Daŭriĝo de la Ekskurso

Je la 15,30a horo: Realveno en la centro de Antver-

peno, tra la granda Skeldo-tunelo;

Oficiala Ferma Kunsido

Je la 16a horo: Granda propaganda Balon-« rallye ».

Je la 17a horo: Laŭplaĉe: Disigo de la Kongresanoj;

aŭ Daŭrigado de la interamikiĝo en

gaja sfero.

PROPAGANDA BALON-RALLYE

Dimanĉon posttagmeze okazos, sur granda placo en la mezo de la urbo, la supresendado de amaso de balonoj kun propaganda enskribo kaj al kiu ĉiuj kongresanoj partoprenu per ne nur unuopa, sed amasa aĉeto.

Ĉiu balono kunportos karteton, kun la kongresnumero de la aĉetinto. Kaj la tri kies balono flugos plej malproksimen, laŭ la adreso de la resendontoj, akiros libro-premion.

La resendontoj mem estos rekompencataj per senpaga dokumentado pri nia lingvo.

Tiu « rallye » devas do iĝi propaganda demonstracio antaŭ la Antverpena publiko; samtempe okazo por interesigi trovontojn en Belgujo kaj Nederlando, kaj eble eĉ Francujo kaj Germanujo... Kaj ankaŭ okazo por gajni belan libron.

Mendu do per la aliĝilo.

JUBILEA BENELUKSA KONGRESO

1 - 2 & 3 an de junio 1963

ANTVERPENO

LA L. K. K.

La delegitoj de « La Verda Stelo » kaj de « Rekta Vojo » kunvenis kaj formis la Lokan Kongresan Komitatojn por nia Jubilea Beneluxa Kongreso, kiu okazos, en kunlaboro inter L.E.E.N. kaj B.E.F., dum la pentekostaj tagoj de 1963, nome la 1-an, 2-an kaj 3-an de junio, en Antverpeno.

Reprezentantoj de la du organizantaj asocioj estas :

S-ro H. M. Schippers prezidanto de L.E.E.N.
S-ro Henri Sielens honora vicprezidanto de B.E.F.

La L.K.K. mem konsistas el :

S-ro Fernand Volders prezidanto
S-roj Remy Van Eynde kaj
 Jos. Lernout vicprezidantoj
S-ro Jules Verstraeten sekretario
S-ro René Balleux kasisto
S-ro Raf. Segers loĝiga servo
S-ro François Schellekens festorganizanto
S-ro Roger Jaumotte gazetara sekretario
S-ro Ivo Durwael junularaj aferoj

R. De Schepper
Jozef Montmirail membroj de la L.K.K.

Ĉeestos krome la kunsidojn de la L.K.K., kiel konsilantoj, la en Antverpeno loĝantaj estraranoj de Belga Esperanto-Federacio :

S-ro Maurice Jaumotte prezidanto
S-ro Luc De Marré ĝenerala sekretario

La Kongreskotizo

Interkonsente kun L.E.E.N. kaj B.E.F., la L.K.K. do pagigos kongreskotizon de F 100. La dua kaj kromaj enloĝantaj familianoj de aliĝinto povos aliĝi pagante nur F 75 (ankaŭ la junuloj malpli ol 21 jaraj).

Ekde la fino de aprilo (t.e. dum la lasta monato antaŭ la kongreso) la kotizo de F 100 iĝos F 140 ; tiu de F 75 ; F 105.

Hotelrezervigo

Malgraŭ la fakto ke hotelrezervigo estas ĉiam tre malfacila dum pentekostaj tagoj, kie ajn, la L.K.K. tamen promesas fari sian plej grandan eblon por kontentigi plene la kongresanojn, kiuj frutempe sin turnos al ĝia loĝiga servo.

Specialaj kondiĉoj por tiuj, kiuj loĝos 3-4ope en unu ĉambro.

WILLIAM GILBERT : « **Planiingvaj Problemoj** ». Eldonis « Stafeto » en la serio de la Beletraj Kajeroj ; La Laguna 1962 ; 99 paĝoj ; prezo : 1 Us.Dol. 50 B.F.

Ĝis antaŭ kelkaj jaroj la plej multaj esperanto-grupoj nenion sciis pri aliaj mondlingvoj. Se oni povas tion kompreni flanke de la simplaj membroj kiuj, ofte, venis nur por lerni esperanton kaj nenion pli demandis, tio estis tamen malpli akceptebla flanke de ties gvidantoj. Mi konas multjarajn prezidantojn kiuj nenion sciis pri tio ! Sed lastatempe niaj revuoj kaj kelkaj aliaj publikigaĵoj skribis pri ili. Kial gvidantoj bezonas koni iom la historion de la mondlingvoj kaj do detalojn pri aliaj projektoj ? Car oni nepre devas vidi la fenomenon « esperanto » en la tre vasta kadro de la evoluo de la homaro. Cetere estas nur tiamaniere ke oni povas kompreni la necescon de esperanto kaj ĝian plenvalorecon.

Due. Se oni iomete studas detalojn de la aliaj mondlingvoprojektoj, oni konstatas ke la kelkaj ankoraŭ defendataj aliaj lingvoj estas ĉiam en la eksperimenta stadio, dum ke esperanto ne plu estas en tiu stadio ! Kaj tio estas ekstrema grava ! Oni nepre akcentu tion kiam ni defendas nian lingvon ĉe eksterstarantoj ! Sed por tio necesas koni ne nur nian lingvon, sed ankaŭ posedi nociojn de aliaj ; kaj... posedi libron kiel fonton el kiu oni povas ĉerpi sian scion kaj argumentojn. Vere, libro kiel ekzemple « Histoire de la Langue Universelle » de la profesoroj L. Léau kaj L. Couturat (eldono Hachette en Parizo) havas pure sciencan valoron. Sed ni ne forgesu ke manpleno da aliaj mondlingvoj havas manpleno da adeptoj kaj skeptikigas per siaj artikoloj sufiĉe grandan nombron da personoj. Estas ne maleble ke tiu el niaj grupgvidantoj subite staros antaŭ persono konanta kaj defendanta ekz. Interlingue. Kion fari ? Ni, Nederlandlingvanoj havas, feliĉe, la ampleksan kaj bonegan verkon de Dr. Manders. Sed ĝi estas vere profunda studo. Tie-ĉi kuŝas sur nia librotablo tre taŭga, bone uzbla kaj ne tro ampleksa libro de eksoccidentalistoj ; kaj kiu prezentas la avantaĝon ke ĝi pritraktas ankaŭ Interlingua, tiu lasta nepritraktita en la libro de Dr. Manders. Ni, en nia lando, certe deziras vidi pritraktita ankaŭ la plej lastan (?) projekton, tiun de S-ro A. Alfandari : Neo. En la belgaj gazetoj estas farata iom regule propagando, eble financita de la kreinto mem(?). Ni ja ensendis jam kontraŭargumentajn artikolojn. Sed tamen la por-Neo-kampanjo tute certe havas kelkajn sekvojn, se ĉe minimumajn. Kaj estus bone retrovi en ĉapitro de libreto, kondensitaj la ĉefaj argumentoj kontraŭ tiu Neo.

La studo de W. Gilbert montras en tre konciza kaj klara maniero la mankojn, la erarajn, la kontraŭdirojn de Ido, Interlingue (antaŭe Occidental) kaj de la projekto de la I.A.L.A. : Interlingua. Fine ne trovas eĉ gramatikajn kompartabelon pri tiuj du lastaj sistemoj. Tiuj mankoj estas montritaj en rilato kun la akuzativo, la alfabeto, la afiksoj, la neologismoj, la vortfinajoj ktp. Tiu-ĉi studo estas kompreneble ne elĉerpa. Pri ĉiu punkto oni povus aldoni. Rilate la koncernajn punktojn en la aliaj sistemoj, ni ne sufiĉe konas ilin por povi prijuĝi ; tion ni devas lasi al la kompetenteco de W. Gilbert, kiu mem staris en tiu movado. Oni tamen permesu ke ni aldonu niajn konsiderojn al unu ĉapitro, la 16a, sub titolo « Estas necese esplori vortaron... ». S-ro Matejka, granda defendanto de Occidental, riproĉas al Esperanto ke ĝiaj vortradikoj havas karakteron ĉu substantivan, ĉu adjektivan, ĉu verban. Li donas ekzemplon : broŝ' estas substantivo kaj komb' estas verbo. Sed, li demandas, kiel sci tiu ? Oni devas esplori vortaron. Jen malfacilaĵo ! W. Gilbert diras ke kontraŭ la teorio ke tia sistemo nedubeble multe erarigas, staras la esperantlingva praktiko ke oni envere tre malmulte eraras ĉar en la plej multaj kazoj oni sentas ke kur, frap' estas verboj, kaj bon, bel' adjektivoj. Mi volus aldoni ke tamen tio estas malfacilaĵo ! Sed, neevitebla malfacilaĵo. Ni pri konsideru tion foje. Ni lernas en la « Plena Gramatiko » de Dr. G. Waringhien kaj Dr. K. Kalocsay (tiu vere monumenta verko) (2a tralaborita eldono, Literatura Mondo, Budapeŝt, 1938, paĝo 36) ke estas de Saussure kiu starigis la kategorian dividon de la vortoj kaj ke Dr. L.L. Zamenhof aprobis ĝin en privata letero al li. Ni legas plu ke Ĉefeĉ. L. Thomson, kaj kelkaj aliaj proponis dividon de la vortoj en du kategoriojn : abstraktaj radikoj kaj konkretaj radikoj. Du aliaj rifuzis ĝian kategorian dividon. En la citita libro oni povas legi la filologiajn argumentojn kial tiuj du proponoj estas ne allaseblaj kaj kial la triopa divido necesas. Mi klopodu tie-ĉi klarigi al ne-filologoj, simplamaniere, kial necesas ke la radikoj de la esperanto-vortoj devas havi karakteron ĉu de substantivo, ĉu de adjektivo, ĉu de verbo. Se ili ne

havas, tiam ekz. « penso » povus egale esti la penso kaj la ago de pensi. Vi pensas eble tamen trovi elirvojn se en la dua signifo oni dirus: la pensio. Sed, unue, la sinsekvo de pluraj finajlitroj estas maloportuna; kaj, due, oni ofte troviĝos antaŭ substantivo (kiel estas la kazo en la montrita ekzemplo). Dua kontraŭargumento. Scienca instituto estas instituto por scienco. Kaj kio estas bela instituto? Ĉu instituto bela aŭ instituto por la bel(ec)o? Tia konfuzo eblas se la radikoj ne havas difinitan karakteron. Nur pro tio ke bel' estas adjektivo ni scias ke bela instituto estas belforma; kaj ke ni devas ion aldoni al la vorto bel' se ni volas komprenigi ke estas instituto por la beleco. Tiamaniere la ĉi preparolita libreto donas eblecon por plua priserĉo rilate preskaŭ ĉiujn ĉapitrojn. Sed kiel mallonga, ne strikte filologia kaj facile uzebla manlibro por juĝi pri esperanto en komparo kun aliaj projektoj, ĝi estas ideala. Tial ĉiu kiu havas iom gvidan postenon en nia movado kaj ĉiu grupa biblioteko devas posedi ĝin.
Drs. F. ROOSE.

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA, WILRIJK

En la Belga Statgazeto de la 24a de oktobro 1962, sur p. 1633, sub akta numero 4348, aperis la jena informo pri likvidiĝo de R.B.L.E.

Sekve al decido de la eksterordinara ĝenerala kunsido de Reĝa Belga Ligo Esperantista (Kon. Belgische Esperanto-Bond — Ligue Royale Esperantiste Belge), kiu decidis plue prilabori sian celon en la kadro de la « BELGA ESPERANTO-FEDERACIO », starigita je iniciato de Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj de Flandra Ligo Esperantista, kiuj kunigos siajn plej bonajn fortojn, la Reĝa Belga Ligo Esperantista likvidiĝis ekde hodiaŭ.

La kredita saldo de la kazo je la momento de tiu ĉi likvidiĝo, sumiĝante je F 957, estos, — post pago de la fakturo de la « Belga Statgazeto » pri tiu ĉi aperigo —, transdonata al la Belga Esperanto-Federacio, societo sen profita celo, por ĝia speciala kazo por membro-varbado; la Fondajo Antoinette Jennen.

Wilrijk, la 5an de oktobro 1962

Por konforma kopio
La likvidanto,
Maur. Jaumotte,
prezidinto.



Du kilogramojn da sukero, unu botelon da oleo, kaj skatolon da dentpurtiloj ... sed tru por tio al S-ro Jacobs, kie ili estas pli malmultekostaj!



Ne plu legu „Heroldo“ dum ke vi preparas la tagmanĝon

3.8 - 11.8.1963

Sofio - Bulgarujo

kontizoj

Kategorio	ĝis 31.12.1962	ĝis 31.3.63	post 31.3.63
Kongresano	560	644	728
Edz(in)o	280	322	364
Junul(in)o ĝis 20j.	350	406	462
Studentoj(20j ĝis 30j.)	210	238	280
Blindulo & gvidanto	280	322	364
[Individuaj membroj de Universala Esperanto asocio pagas la jenajn sumojn :			
Kongresan(in)o	490	574	658
Edz(in)o	245	287	329

Pagu al S-ino Plyscn, Bruselo, P.K. 2368 04

KARAVANO AL LA SUNO

- Vojaĝplano :** Foriro la 30.7.63 ĝis Heilbronn, la koro de la Neckarlando. La unua tago estas la plej peza, ĉar ni devas kiel eble plej baldaŭ atingi la interesajn punktojn de nia vojaĝo, sed ĝi plejparte okazos sur la rapidvojoj de Belgujo kaj Germanujo. La vesperon ni tamen povos trapasi en tre bela cirkaŭaĵo.
- Merkredo la 31.7.1963:** Heilbronn, denove sur la aŭto-vojo ĝis München, kie ni tagmanĝos, kaj baldaŭ poste forlasos la grandan vojon por enpenetri la belegan landon de Tirolo, laŭ Kufstein, Kitzbühel por vespermanĝi kaj resti en Zell-am-See aŭ la cirkaŭaĵo. Dum tiu dua tago ni nur faros 450 Km de kiuj 300 matene sur la aŭtovojo. Espereble ni trapasos veran ekskursan posttagmezon.
- Ĵaŭdo la 1.8.63:** de Zell-am-See ni trapasos la vojonojn de la Grosz-Glockner (3797 m) unu el la plej belaj kaj imponaj de Aŭstrujo, por fini la tagon en la cirkaŭaĵo de la landlimo inter tiu lando kaj Jugoslavujo, preterpasante la Wörthersee. Maksimume 250 Km entute.
- Vendredo la 2.8.63:** Denove sur la granda aŭtovojo de Jugoslavujo, Ljubljana kaj Zagreb al Beograd kaj vizitante la tre malmultajn interesajn laŭ tiu vojo. Beograd mem estas jam multe pli orientaspekta ol Zagreb. 500 Km sur la aŭto-vojo.
- Sabato la 3.8.63:** Ni foriros el Belgrado verŝajne boate ĝis Smederevo, la malgranda urbo kun la turkaj fortifikacioj kiuj restis preskaŭ sensange dum jarcentoj, kaj poste ni daŭrigos al Sofia, pasante tra Niš. 325 Km.
- Vi rimarkos ke ni klopodis ellabori vojaĝplanon per kiu ni en tre mallonga tempo alvenos en Sofio, samtempe vizitante la plej interesajn urbojn kaj vidindaĵojn sen ke ni vere, krom la unua tago, devas fari pli ol meze 400 Km po tago. La reveno ek de sabato la 10.8.63 ne ankoraŭ estas detale ellaborita (pro la fakto ke de Hungarujo ni ne ankoraŭ ricevis dokumentaĵojn) sed ni jam komunikis ke, ĉar ni disponas pri multe pli da tempo ol venante, (5 tagoj por veni, 8 por hejmeniri) ni certe restos unu tagon en Budapesto, kaj unu en Prago.

G. FAES

Eiermarkt, 21
ANTVERPENO

★ Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO
Tel.: 15.19.92

Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

Kompreneble ke ni faros ankaŭ en Bulgarujo diversajn ekskursojn per nia aŭtobuso kiu malpliialtigas konsiderinde la kongresajn kostojn kaj obligos al ne viziti tiun belan landon ĝisfunde. Ni planas ekskurson al Thessaloniki en Grekujo.

Ci-tiu belega vojaĝo post la fera kurteno kostas nur 6000 F, verŝajne pli malmultekosta por geedzoj aŭ por tiuj kiuj volas dormi en sama ĉambro; ni tamen ne inkluzivis la restadon en Bulgarujo, ĉar tio tro dependas de la ŝatoj. La hoteloj dumvoje estas unuaklasaj, ĉiuj eniroj en muzeoj aŭ turistaj vidindaĵoj estas ĉalkulitaj en tiu vere malalta sumo; pro la fakto ke ni mem pri zorgas ĉion, ni tamen devas peti antaŭpago 1000 F, ekster la 6000 F ĵus menciitaj, por povi pagi la kongreskotizon por Sofia kaj la administrajn kostojn. Se vi mem jam pagis rekte al UEA la kotizon por la kongreso, tiam tiu antaŭpago sumiĝas nur je 500 F; kompreneble ke la antaŭpago ne povas esti repagita. Ĉiuj aliaj elspezoj estos petitaj kiam tio estas nepre necesa, sed certe plej laste unu monaton antaŭ la foriro, ĉar grandparte ni devos antaŭpago la hotelkostojn, kaj diversajn aliajn elspezojn. Se hazarde iu en la lasta momento ne povas kuniri, ni garantias la repagon de preskaŭ la tuta sumo, krom la antaŭpago.

Kromaj sciigoj:

1. Aŭtobuso Mercedes por 34 personoj, enskribo nur por 29. Tiel ni disponas pri libera loko malantaŭ la aŭtoĉaro, se iu preferas sin kuŝi dum kelka tempo, aŭ volas iom ripoziĝi la piedojn.

2. Loko en la aŭtobuso laŭ la enskriboj, kiujn ni publikigos ek de la januara-februara numero de Sonorilo; jam 12 personoj enskribis. Vi povas ĉe la enskribo aldoni viajn preferojn rilate la sidlokon, kiujn ni plenumos laŭeble.

3. Pagoj nun devas okazi nur por la enskribo (1000 F kun la kotizo aŭ 500 F sen la kongreskotizo) je la P&K de Maertens G., Pr. Leopoldstraat 51, Sint Kruis, Belgujo n° 2914.29. La pagoj por la vojaĝo kaj la restado devos okazi je alia numero, poste indikota.

4. Forirloko: Bruĝo verŝajne je la 7-a mateno; ni povos indiki poste la horon de alveno en la lokoj de kie aliaj kunvojaĝantoj povas ensalti: ekz. Gento, Bruselo, Lieĝo, k.t.p.

5. Dokumentaron kaj priskribon de la tuta vojaĝo estos transdonata al ĉiu konvojaĝanto;

6. La hoteloj kaj la vojaĝvojo estas — ni je estas senspertaj pri kelkaj lokoj post la fera kurteno — aprobitaj de la VTB (Flandra Turista servo);

7. Ni serĉas kontakton kun la lokaj Esperantistoj kie nie tranoktos aŭ kie ni planas iun pli detalan viziton;

8. Ni kunportos ĝojan koron kaj ĉiam suden veturos, al la suno!

MAERTENS G.

GRUPA VIVADO

ALVOKO AL LA GRUPAJ KASISTOJ

Sub la rubriko «Repagu vian kotizon», ni jam faras alvokon al la grupaj kasistoj, por ke ili klopodu **samtempe enkasigi** la kotizon por la grupo kaj federacio kaj la kotizon de MS, MA aŭ MJ de U.E.A.

La lokaj kasistoj ŝajnas efektive plej bone lokitaj por fari, olte per **persona** kontakto, la unuan alvokon kaj klopodon por re-enspezigi la kotizojn de U.E.A.

La ĉefdelegito tiucele havigos al ĉiuj grupaj kasistoj liston de la membroj de la grupo, kiuj estas individuaj membroj de U.E.A. dum la nuna jaro 1962.

Kompense por tiu kunlaboro de la grupa kasisto, la ĉefdelegito por nia lando cedos 5 % de ĉiuj tiel reakiritaj kotizoj al la loka grupo.

Tio signifiĝas ke la lokaj kasistoj, ĉe la transpago al la ĉefdelegito rajtos de preni **5 % por la grupa kaso**. Ili do pagos al la ĉefdelegito F 300, F 200, F 100 malpli 5 % do: F 285, F 190 aŭ F 95.

Tiel ĉiuj lokaj grupoj estos mem finance interesataj en la pliampleksigo de la U.E.A.-membraro kaj la pligravigo de nia universala asocio.

La transpagoj de tiuj U.E.A.-kotizoj okazu al la **P.C.K. 90.51.25 de S-ro Franç. Schellekens, Frans Hensstraat 44 Antverpeno**.

La parto de la grupa kotizo, kiu apartenas al la Federacio, do F 80, F 40 aŭ F 20 laŭ la kategorioj, estas, kiel antaŭe, transsendota al la nacia kasisto, nun, — por ĉiuj ni —, la Federacia Kasistino F-ino J. Terry, Raapstraat 72 Gento (**P.C.N. 16.34.34 Belga Esperanto-Federacio, Gento**).

Do resume: la grupaj kasistoj estonte pagos al **du instancoj**: la ordinarajn kotizpartojn al la Federacia kasistino por la poŝtĉeknumero de la Federacio; la kotizojn de individuaj membroj de U.E.A. al la ĉefdelegito per ties privata poŝtĉeknumero kaj kun depreno de 5 %.

Tiel pleneffektivigos, en plena harmonio, la fina kunfandiĝo de ĉiuj niaj financaj servoj.

Tiel ankaŭ la ĝenerala propagando por la loka, la nacia kaj la internacia movado okazos en intima kunlaborado de ĉiuj instancoj de nia movado.

LA ĈAMBROJ EN LA U.E.A.-DOMO

Kiel niaj legantoj scias, la Universala Esperanto-Asocio, antaŭ nelonge, aĉetis kaj eniris sian novan, propran domon en Rotterdam.

Parto de la aĉetprezo estas pagita jam per propraj rimedoj; alia parto dank'al hipoteko.

Por plifaciligi la repagon de tiu hipoteko kaj ankaŭ por ebligi la bonan funkciadon de siaj servoj en la nova domo, U.E.A. faris alvokon al bonvolemaj pagipovaj samideanoj, por ke ili faru donacon de «ĉambro», per la pago de sumo de ĉirkaŭ F 50.000.

Nun jam, kvin tiuj «ĉambroj» estas donacitaj al U.E.A. kaj ni ĝojas kaj fieras ke unu tia ĉambro estas donacita de plej malnova paro, kiu de dekoj da jaroj apartenas al nia nacia organizaĵo, unue pere de Antverpena, — poste kaj ĝis nun —, de la Brusela Grupo.

Tiu paro apartenas krome al plej granda esperantista familio de nia Belga Esperanto-Federacio, ĉar ĝi konsistas el 8 membroj, gefiloj kaj genepoj de la donacintoj.

Temas pri niaj malnovaj amikoj, nun loĝantaj en Monaco, sed kiuj ĉiujare regule revenas al Belgujo, kie loĝas ilia tuta familio, kaj kiujn la kongresemuloj inter niaj membroj ĉiam re-renkontas dum la Universalaj Kongresoj, nome pri **G-esinjoroj Joseph kaj Pelagie Derks**, kiuj ekkonis unu la alian, jam antaŭ la unua mondmilito kaj kiuj, jam en tiu unua periodo de nia movado, veturis al universala kongreso.

Ili estas inter niaj plej malnovaj veteranoj kaj ni kore gratulas ilin pro la larganima gesto, kiun ili plenumis favore al nia Universala Esperanto-Asocio.

Kaj ni ĝojas ke, — precize antaŭ kelkaj tagoj dum sia jara festeno —, la Esperantista Brusela Grupo povis speciale honorigi kaj festi, jam pro pli ol

kvaronjarcenta membreco, la filinon de G-roj Derks: Sinon Dora Gorgemans, kiun ne nur multaj brusclanoj, sed ankaŭ aliurbanaj konas, jam de antaŭ la dua mondmilito, kiam ŝi regule jam partoprenis nian esperantan vivon.

Ni fieras pri tiuj ĉi karaj membroj kaj amikoj kaj pri ilia bela verda familio!

Nia antverpena samideano. Wim Desmet el Borgerhout edziĝis la 22. 12. 1962 kun Hilda Kriekemans. Gratulojn.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo «La Verda Stelo»
Poŝtĉeknumero: 726.54

La 12an de oktobro en agrabla restoracio «A la coupe glacée» Koningin Astridplein, pli ol 35 verdstelanoj partoprenis al la ĉiujara «Mitulvespermanĝo». Ĝi denove bonege sukcesis pro la granda manĝemeco kaj bonhumoro de la ĉeestantoj.

La 19an F-ino Anny Enzlin per bela kolorfilmo memfarita kaj per parolado pri «La procesio de Sevilla dum la Sankta Semajno» sukcesis krei interesplenan atmosferon. Siaj bildoj kaj paroloj kvazaŭ montris la realecon kaj cetere skizis la evoluon de tiu mondfama evento ĝis en la plej malgrandaj detaloj. Konsekvence ŝi akiris grandan aplaudon.

La 26an S-ro R. Van Eynde kiel dum antaŭa samtema parolado denove vekis la atenton de la ĉeestantoj per siaj detaloj pri diversaj «Sociaj Aspektoj de la Ekonomio en nia Lando». Li pritraktis i.a. la siderurgian industrion, la argil-kaj ŝtonindustriojn en la teritorio de Boom, la diamantindustrion de Antverpeno kaj la konstruadon de la granda digo laŭlonge de la Mozo inter Seraing kaj Tilleur.

Dimanĉon, la 28an E.K.I. de Antverpeno organizis distran posttagmezon en la kunveno de «Witte Leeuw», bone ĉeestita de la antverpenaj grupoj. Je la 15a h. la Prez. S-ro Maur. Jaumotte bonvenigis la ĉeestantojn per afablaj vortoj kaj transdonis la parolvicon al S-ro Raf Segers kiu komentariis preskaŭ dum tuta horo kolorigitajn lumbildojn pri la evoluo de la nunaj raketoj, pri sovaĝaj bestoj, birdoj kaj insektoj. S-ro C. Borremans kantigis al ni diversajn folklorajn kantojn kaj poste laŭ amuza maniero gvidis «kvison» pri la historio de Antverpeno. Ankaŭ la gejunuloj (kiuj ĵus fondis Belgan TEJO-sekcion) vigle partoprenis al la vespero konkludita per parolado de

Jugoslava samideano pri «Nepalo» kaj pri kiu li montris amason da rimarkindaj kolorigitaj diapozitivaj. S-ro R. Van Eynde, Vic-prez. dankis kaj konkludis la vesperon per simpatiaj vortoj.

La 2an de novembro S-ro Maur. Jaumotte komentariis la 50 diapozitivajn kiujn B.E.F. aĉetis propagandecle pri «Esperanto». S-ro F. Schellekens, el sia kolekto, aldonis kelkajn dekojn da ili precipe pri la 45a U.E.K. de Bruselo. Diversaj konstruigaj kritikoj aŭdiĝis kaj konkludo estis ke oni klopodos pliriĉigi la tutan serion.

La 9an de novembro S-ro Fr. Schellekens paroladis pri sia vojaĝo kaj restado al «La Costa Brava en Hispanujo». Precipe rimarkindaj estis la multaj kolorigitaj diapozitivaj kiuj ne nur atestas pri la intereso kiun S-ro Schellekens montras por la naturo kaj la mondo ĉirkaŭ li, sed ankaŭ pri lia arta gusto kiun li abunde manifestas preskaŭ en ĉiu bildo.

Programo de la venontaj kunsidoj:
Ĉiuvendrede en «Witte Leeuw», Frankrijklei, 4 je la 20,15a h. (1a etaĝo).

DECEMBRO: la 7an: Sankta Nikolaa atmosfero; la 14an: Zamenhofa Vespero en la kadro de E.K.I.; Dimanĉon, la 16an: Infana Kristnaskfestoj je la 15a h. en Witte Leeuw; la 21an: Kultura distra vespero gvidata de S-ro Roger Jaumotte; la 28an: Parolata Jurnalo gvidata de S-ro Fr. Schellekens.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista, Reĝa Societo
(Poŝtĉekkonto N° 4835.33)

La du lastajn «somerajn» kunvenojn, la 4an kaj 11an de septembro, la ĉeestantoj pasigis per esperanta kartludado.

La 18an de septembro komenciĝis la «vintra» agado per publika prezentado de kolordiapozitivaj pri Esperanto, prepare al la nova kurso por komencantoj.

Proveleco de tiu kurso estis donata la 25an, de S-ro J. Eneman, kursgvidanto.

Jaŭdon 27an okazis en Middenstandshuis, komuna kunveno de la du lokaj grupoj, kiuj kune akceptis S-ron M. Jaumotte, Prez. B.E.F. Tiu ĉi faris tre interesan paroladon pri sia vojaĝo malantaŭ la fera kurteno kaj montris kelkajn lumbildojn el granda alportita kolekto. Bedaŭrinde la projekcia aparato difektiĝis post duonhoro, sed kompense la preleganto paroladegis dum pli ol du horoj, ne lacigeble kaj ne lacigante, sciigante multajn interesajn detalojn pri la vivo en la travojaĝitaj landoj.

La unua leciono de la elementa kurso estis donata la 2an de oktobro, de S-ro J. Eneman, kiu tuj poste ankoraŭ gvidis interesan konkurssludon.

Post la leciono de la 9a de oktobro, F-ino. Y. Poupeye disaŭdiĝis kaj komentariis kelkajn sukcesajn diskojn.

Familia Kroniko

Gratuloj al Ges-roj Karlo Poupeye-Roose, gemembroj de B.G.E., pro naskiĝo de tria infano, filineto Elsje (30.9.62).

Programo por venontaj kunsidoj:
JANUARO 1963a: 1-an: Novjaro: Kunveno ne okazos.— 8an: Festado de la tri Reĝoj.— 15-an: Parolata gazeto.— 22-an: Generala jarkunsido: Raportoj, Elekto de la komitato.— 29an: Impresoj pri Luksemburgo: F-inoj Yol. kaj Chr. Van Parys.

PACO KAJ JUSTECO, BRUGO

Dimanĉo la 4.11.62 estis ĝojplena tago



Dum la akademia kunsido: D-ro Waringhien paroladas. Ni rimarkas: Prezidantoj Debrouwere & Jaumotte, F. Roose, L.P.M. Beckers & R. Iserentant



La FESTITIOJ, la gastoj kaj la grupanoj de Paco kaj Justeco post la bankedo

tika salono de la urbodomo, kaj estis prezidata de S-ano Jaumotte, kiu enkondukis kaj invitis la diversajn delegitojn por esprimi iliajn bondezirojn. Citindaj frazoj estas:

« Dank al la regulaj kaj ege interesaj kunvenoj, la klubo entiras en la regiono de ĝia funkciado plurajn interesajn iniciativojn vintre kaj somere kaj pro tio ĝi progresas kaj kreskas » de rev. Pastro Beckers.

« S-ro F. Roose kaj S-ro Iserentant vi ambaŭ jubileas, vi ambaŭ estas ankoraŭ la nuraj fondintoj kiuj hodiaŭ restas. 25 jarojn vi restis fidelaj al la ideoj kiujn vi havis ĉe la fondo de Paco kaj Justeco al kiu vi donis viajn plenajn fortojn. Sed honeste mi devas diri ke vi ne staris solaj en la granda batalo por la neŭtrala mondlingvo. Apud vi staris iuj plenzorgaj, iuj kies nomoj ne tiel ofte aŭdiĝis, sed kies helpo, kies agoj estis des pli mirindaj! S-ino Roose kaj S-ino Iserentant estas pri vi ke mi parolis. Mi dankas vin, elkore mi dankas vin pro la pacienco, pro la toleremo, pro la kompreno kiujn vi montris dum longa funkciado de via kara edzo. Mi konsentas: ne ĉiam estis facila, des pli granda estas la merito. »

La plej delikatan sed samtempe la plej aplauditan bondezirojn eldiris S-ano Poupeye. Ĝi meritis esti publikigita entute, sed ni limigas ĝin je la plej belaj partoj:

« Ni eĉ konfesu ke dum jaroj la du Esperanto-grupoj en Bruĝo sin reciproke tutsimple ignoris.

» Niaj du grupoj estis longtempe kiel du akraj rokoj falintaj, proksime unu de alia, en la saman riveron... Sed la jaroj forpasis kaj la senĉesa fluo de la tempo malrapide, sed konstante kaj certe, iom post iom, forrobotis la akrajn pintojn de ambaŭ rokoj kaj kovris ilin per dolĉa musko... sur kiu oni povis sidi por iom babili.

» Kaj ni interbabilis... kaj konstatinte ke ni parolis saman lingvon, ni daŭrigis la interparoladon ĝis kiam ni povis, antaŭ preskaŭ dek jaroj, ĵeti unuan ponton inter la du rokoj. Tiun ponton ni nomis EKI aŭ Esperantista Komitato Intergrupa.

» Tiu ponto estis fortika, ĉar ni uzis ĝin ofte por viziti unu la alian kaj ĝi neniam difektiĝis.

» Via grupo do ekzistas jam dudek kvin jarojn kaj tamen ĝi estas ankoraŭ tre juna. Homo dudek kvin-jara estas nur duonvoje inter la plenkreskeco kaj la matureco, sed societo povas vivi multe pli longtempe ol homa estaĵo; do por societo, jarcentkvarona ekzistado signifas ankoraŭ plenan juncon.

» Kaj tiun juncon oni efektive povas konstati per la entuziasmo kaj laboremo de viaj membroj.

» Al tiu juna entuziasmo, al tiu forta laboremo, mi tutkore omaĝas,

nome de nia Bruĝa Grupo Esperantista, jam multe pli aĝa, ĉar ĝi estas — kiel bedaŭrinde ankaŭ ĝia prezidanto — nun jam sesdekjara.

» Mi povas do malfacile proklami ke Bruĝa Grupo Esperantista esprimas al vi « fratan » saluton, sed pli bone kaj pli ĝuste, « patran ».

» Kaj se ni povas konsideri ke nia Bruĝa Grupo Esperantista estas iamaniere la patro de via grupo, Paco kaj Justeco, tiam ankaŭ klare montriĝas, ke se — kiel ofte okazas en la vivo — oni estis en la gepatra domo iom malkontenta, kiam unua ido forflugis por fondi novan hejmon, nun ni ĝojas kun tiu sama ido, tial ke li tiel bone sukcesis kaj donis tiom da bonaj infanoj al nia esperanta familio. »

Denove la Prezidanto de Paco kaj Justeco dankis kaj menciis la idealismon kiu ankoraŭ vivas en nia grupo. La kunsida Prezidanto poste transdonis la parolvicon al D-ro Waringhien

kiu tre interese paroladis pri la eblecoj de Esperanto, pro la novaj ordinatoroj kiuj jam postulas la uzadon de internacia racia lingvo.

La festeno okazis en Bruĝa hotelo, kaj denove S-ro Jaumotte alparolis nin, ĝoje pro la fakto ke li ĉestis por la unua fojo oficialan feston kiel Prezidanto de B.E.F.

Poste okazis la transdono de rememorajo en keramiko al ĉiuj membroj de la grupo kaj la honoraj gastoj el la manoj de S-ro Debrouwere G., kaj memorplado transdonita al la jubileantoj post dankesprimoj, nome de la grupano, fare de G. Maertens.

Florbukedo estis donacita al la edzinoj de la jubileantoj el la ĉarmaj braketoj de la filinoj Dumarey.

Post la grupofotografado kelkaj ankoraŭ sekvis D-ron Waringhien, rev. Pastro Beckers kaj S-ro Debrouwere en la ĉiam gastama hejmo de Ges. Roose-Dekersgieter.

Esperanto en la lernejoj

S-ro Juliaan ENEMAN, kursgvidanto de la Bruĝa Grupa Esperantista, instruisto en la Statmezgrada Lernejo de Sint-Kruis, akiris oficialan permeson instrui Esperanton dum posthora kurso en la dirita lernejo. Cirkulero al la gepatroj estigis la enskribon de 45 ĝelernantoj, 11- kaj 12-jaraj, kiuj komencos la studon ek de januaro 1963a.

Ni kore gratulu tiun fervoran samideanon kaj pensu ek de nun pri donacado de libropremioj al la estontaj laŭreatoj de tiu kurso.

VERVIERS Trilanda Renkontiĝo

La 15an kaj la 16an de septembro organiziĝis en Verviers unu plia trilanda renkontiĝo.

Sabate okazis tiuokaze festo, kiu estis prizorgita ĉefe de la junaj esperantistoj, kiuj en la Atenco sekvas la kurson de nia propagandisto Prof. Vanbreuse.

Post la aŭdigo de « La Espero » (A. Stutman kaj Lemaire) estis prezentita

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C^o

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

« Georgo Dandin » de Molière. La ge-
 aktoj estis Pierre Demeyts (Dandin),
 F-ino Jeanine Châineux (Angeliko), An-
 dré Stutman (S-ro de Sotenville), S-ino
 Vanbreuse (lia edzino), Georges Ren-
 kin (Klitandro), Arlette Demeyts (Klaŭ-
 dino) kaj Andra Stutman (Lubin).

Sekvis francelingvaj kaj esperantaj
 skeĉoj de Fernand Reynaud, prezenti-
 taj de André Stutman kaj violonludado
 de André Stutman kaj Claude Lemaire.

S-ro Hérion, la prezidanto de la Gru-
 po, bonveniginte speciale la eksterlan-
 dajn gastojn, inter kiuj du danoj, tri
 nederlandanoj kaj dekdu germanoj, ko-
 re dankis la junajn kunlaborintojn pro
 ilia sindonemo kaj varme akirita suk-
 ceso.

Sekvis tiam balo kun orkestro « La

Meteoroj » kaj okazis monkollekto. Kaj
 ĉar la festo donis profiton, tiu ĉi estis
 donacata al la prefekto de la Ateneo
 kiu tiom favoras la propagandon por
 esperanto.

Dimanĉon okazis akcepto en la urb-
 domo en Jalhay, kie sekvis ankoraŭ
 laborkunsido kaj tagmanĝo en la domo
 de la Naturamikoj kaj posttagmeze eks-
 kurso tra la arbaro.

Ni substreku, okaze de tiu ĉi festeto,
 ke estas jam la 6a jaro ke Prof. Van-
 breuse instruas esperanton en la Reĝa
 Ateneo kaj ke okazas tie du kursoj unu
 ĉiusabate, dum la ĝeneralaj kursoroj,
 kiel « elektita kurso » por la lernantoj
 de la 3a klaso, kaj unu, ĉiulunde, post
 la lernejoj horoj, al kiu povas partop-
 reni do lernantoj el ĉiuj klasoj.



Lerneja inspektoro I. FAYS transdonas diplomon al la juna Jean DENGIS
 En la mezo, B. DENOEL instruisto.

LIEGO

Lieĝa Grupo Esperantista

Jaŭdon la 27an de septembro okazis
 intima ceremonieto okaze de la trans-
 dono de diplomoj al la lernintoj, kiuj
 pasis la ekzamenon pri simpla kono de
 Esperanto.

Post enkonduka parolado de D-ro De-
 noël, prezidanto de la Grupo, la lerneja
 inspektoro S-ro Fays transdonis la di-
 plomojn al Bronzini Ruggero, Dengis

Jean, Duru Guy, Frère André, Garcet
 Robert, Garcia P., Gilissen Georges, Go-
 defroid Marie, Gosset Germaine, Hayet
 Colette, Hayet Marie-France, Hebrans
 M.A., Jeukens L., Kuster A. et Le-
 jeune H.

Kiel fino de la vespero sekvis muzika
 kaj kanta aŭdigado kaj fine la prez-
 idanto anoncis novan kurson, kiu inter-
 tempe komenĉiĝis la 12an de oktobro
 en la normala lernejo de la rue Jon-
 fosse, kun dek lernantoj.

SONORILO aperos komence de februaro (januaro-februaro)

Limdato por ensendoj 22. 1. 1963.

SE VI PAROLAS PRI STROVI... VI PENSAS PRI
 VIANDAĴEJO. SE VI PENSAS PRI VIANDAĴEJO... VI
 AĈETAS ĈE

STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj:

GARANTIO pri

bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono: pogranda komerco 34559

detala " 33408

STROVI estas unuaranga!



- ★ POR VIAJ EKSTERLANDAJ
transpagoj
- ★ POR ŝANĜOJ EN LA PLEJ ALTA
KURZO
- ★ POR VOJAĜDEVIZOJ

Bank van Roeselare & Westvlaanderen

Sidejo: **ROESELARE**

Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.

La plej ofte aperanta

La plej rapide informanta

Esperanto-gazeto

HEROLDO

DE ESPERANTO

De 40 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ★ 20 numeroj jare
- ★ Ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ★ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto ktp.
- ★ Duobla Kongresa numero
- ★ Aktuala filmkolono
- ★ Libera Tribuno de la legantoj

Jarabono : 190 b. F

Abonebla ĉe „Sonorilo”, Blankenberge Steenweg 72 Brugge (pĉk 152140)

*Mendu provnumero ĉe la Redakcio :
13 rue de la ReINETTE-Pippelingstraat, Bruselo 1*

Redaktorino : Ada Fighiera-Sikorska